14a MEKSIKA ESPERANTO KONGRESO

“Interkultura komunikado kaj internacia perado”

Universitata Centro pri Servoj de BUAP

16an-19an de novembro, Puebla

HOTELOJ

Ĉi tiu estas listo de rekomendindaj hoteloj. Tri el ili troviĝas relative proksime de la kongresejo kaj la aliaj tri pli proksime al la urbocentro de Puebla. Oni indikas la distancojn kalkulitaj per Google maps.

Gravas ke vi plej baldaŭ kiel eble faru viajn rezervojn por eviti komplikaĵojn ĉar pro la jubileo de la meksika revolucio, pluraj homoj havos liberajn tagojn.

Legu bone la sekvajn atentaĵojn:

- La partoprenantoj **mem devas zorgi** pri siaj rezervoj kaj pagoj, nur se necesas ni povas helpi ilin, ekzemple en la kazo de eksterlandaj vizitantoj. Por esti pli certaj, ni rekomendas al vi **kontroli la donitajn informojn** pri ĉiu traknoktejo ĉar la prezoj povus ŝanĝiĝi.
- Ĉiuj indikitaj prezoj estas en meksikaj pesoj, la nuna proksimuma valuto de usona dolaro estas 18.8 meksikaj pesoj (komence de oktobro 2018).
- Kvar el la ses hoteloj inkluzivas matenmanĝon.
- Unue vi trovos la plej multekostan hotelon kaj laste la plej malmultekostan, tamen ĉiuj havas bonan kvaliton, la diferenco inter ili estas ekz. la prestiĝo, servoj kaj/aŭ komfortaĵoj, kiujn ili ofertas.
- Atentu ke en la elektoj 2 kaj 3 oni donis **specialan prezon** por gastoj kiuj venas nome de la BUAP. Tial, kiam vi faros vian rezervon, vi devas mencii ke vi partoprenos la Meksikan Esperanto-Kongreson en la BUAP kun kiu la hotelo havas interkonsenton.
- Je la fino vi trovos mapon, sur kiu vi povos vidi kie troviĝas la kongresejo kaj ĉiu rekomendita hotelo.
- Krom la listitaj tranoktejoj, vi ankaŭ povus serĉi tranokteblecojn ĉe AirBnB. Temas pri platformo sur interreto dediĉita al oferto, ĝenerale, de privataj loĝejoj. Por tie rezervi oni devas jam havi aŭ krei profilon, pagoj nur eblas interrete uzante bankokarton. Por pliaj informoj pri ĉi tiu servo vizitu: https://www.airbnb.com/

1. Hotelo *Misión Express Plus*

Adreso: Privada 25 a Sur #3931, Reserva Territorial Atlixcáyotl, Residencial del Valle, Puebla, Puebla. Proks. 2,0km. for de la kongresejo.

Telefono: enurbe 933 6840 **/ enlande sed eksterurbe** (01) 222 933 6840 **/ de eksterlando** (0052) 222 933 6840

Ĉi tiu nova hotelo troviĝas en strato fermita je unu flanko proksime al komerca centro *Plaza*

Angélopolis. Ĝi havas malgrandan parkejon, lavservon por vestaĵoj, ĉambron por eventoj, sendratan reton, trejnejon, trinkejon kaj manĝejon.

La **kostoj** por ĉiu nokto kaj ĉambro estas:

1 persono kun 1 lito duobla [1]	**$1,149.00**
2 personoj kun 1 lito duobla	**$1,149.00**
3 personoj kun 2 litoj duoblaj	**$1,322.40**
4 personoj kun 2 litoj duoblaj	**$1,496.40**

Pliaj informoj: la ĉambroj havas sendratan reton, televidilon kaj telefonon. La **matenmanĝo estas inkluzivita.**

Retejo hispane: https://www.hotelesmision.com.mx/destinos/puebla/misi%C3%B3n-express-plus-puebla-angelopolis/

2. *City Express Puebla Angelópolis*

Adreso: Circuito Juan Pablo II No. 1755, Col. La Noria, Puebla de Zaragoza, Puebla. Proksimume 1,2km. for de la kongresejo.

Telefono: enurbe 211 7000 **/ enlande sed eksterurbe** (01) 222 211 7000 **/ de eksterlando** (0052) 222 211 7000

La hotelo estas kvarstela, ĝi troviĝas en strato kun butikoj, restoracioj kaj proksimaj superbazaroj. Ĝi havas senpagan parkejon, lifton, sendratan reton, lavservon por vestaĵoj, komputilojn, trejnejon kaj kunsido-ĉambron. Ĝi ankaŭ disponigas transporton de/ĝis la flughaveno (oni devas unue demandi pri disponeblo) kaj ĝiaj instalaĵoj uzeblas de handikapuloj.

La kostoj por ĉiu nokto kaj ĉambro estas:

1 persono, kun 1 lito Queen size	**$957.00**
2 personoj, kun 1lito Queen size	**$957.00**
2 personoj, kun 2 litoj Queen size	**$1,073.00**
3 personoj kun 2 litoj Queen size	**$1,305.00**
4 personoj, kun 2 litoj Queensize	**$1,537.00**

En City Express Puebla Angelópolis, la **normala prezo** de ĉambro por 1 aŭ 2 homoj estas $2,088.00, do ili donis al ni bonan rabaton. Menciindas ke en ĉi tiu hotelo tranoktado de kroma homo en jam pagita ĉambro kontraŭ aldona pago **ne eblas**.

Pliaj informoj: la ĉambroj havas klimatizilon, sendratan reton, televidilon, monŝranketon, telefonon, gladotabulon. La **matenmanĝo estas inkluzivita** kaj okazas en neformala manĝejo.

Por certigi ke vi havos ĉambron kun tiu speciala prezo, vi devas rezervi rekte kun Guadalupe Pérez Espinoza kaj mencii ke vi partoprenos la 14an Meksikan Kongreson de Esperanto en la BUAP kun kiu la hotelo havas interkonsenton.

Retejo hispane: https://www.cityexpress.com/express/hoteles-mexico/puebla/puebla-de-

1 Ni nomas duoblan liton al tiu, kiu havas la sekvan grandecon (1.35 x 1.90 m.), ĝia nomo en Meksiko estas "*matrimonial*".

zaragoza/angelopolis

Retpejo angle: https://www.cityexpress.com/en/express/hotels-mexico/puebla/puebla-de-zaragoza/angelopolis

3. Hotelo *City Express Junior Puebla Angelópolis*

Adreso: Circuito Juan Pablo II #1743, Col. La Noria, Puebla de Zaragoza, Puebla. Proks. 1km. for de la kongresejo.

Telefono: enurbe 605 8290 **/ enlande sed eksterurbe** (01) 222 605 8290 **/ de eksterlando** (0052) 222 605 8290

La hotelo estas dustela, ĝi troviĝas en strato plena je butikoj kaj restoracioj. Ĝi havas lifton, sendratan reton, lavservon por vestaĵoj, komputilojn, trejnejon kaj kunsido-ĉambro. Ĝi ankaŭ disponigas transporton de/ĝis la flughaveno (oni devas unue demandi pri disponeblo) kaj ĝiaj instalaĵoj uzeblas de handikapuloj.

La kostoj por ĉiu nokto kaj ĉambro estas:

1 persono, kun 1 lito Queen size	**$812.00**
2 personoj, kun 1lito Queen size	**$812.00**
2 personoj, kun 2 litoj Single/Twin size	**$928.00**

En City Express Junior Puebla Angelópolis, la **normala prezo** de ĉambro por 1 aŭ 2 homoj estas $1,102.00, do ili donis al ni bonan rabaton. Menciindas ke en ĉi tiu hotelo tranoktado de kroma homo en jam pagita ĉambro kontraŭ aldona pago **ne eblas**.

Pliaj informoj: la ĉambroj havas klimatizilon, sendratan reton, televidilon, monŝranketon, telefonon, gladilaron. La **matenmanĝo estas inkluzivita** kaj okazas en neformala manĝejo.

Por certigi ke vi havos ĉambron kun tiu speciala prezo, vi devas rezervi rekte kun Guadalupe Pérez Espinoza kaj mencii ke vi partoprenos la 14an Meksikan Kongreson de Esperanto en la BUAP kun kiu la hotelo havas interkonsenton.

Retejo hispane: https://www.cityexpress.com/junior/hoteles-mexico/puebla/puebla-de-zaragoza/angelopolis

Retejo angle: https://www.cityexpress.com/en/junior/hotels-mexico/puebla/puebla-de-zaragoza/angelopolis

4. Hotelo *Gala*

Adreso: Avenida 3 Poniente 150, Centro, 72000 Puebla, Pue. Proks. 3,1km. for de la kongresejo.

Telefono: enurbe 232 7371 **/ enlande sed eksterurbe** (01) 222 232 7371 **/ de eksterlando** (0052) 222 232 7371

La hotelo estas kvarstela, ĝi troviĝas en tre okupita kaj komerca strato en la urbocentro, 4 minutojn for de la katedralo. Ĝi havas parkejon, lavservon por vestaĵoj, restoracion, trinkejon kaj kunsido-ĉambron.

La **kostoj** por ĉiu nokto kaj ĉambro estas:

1 persono kun 1 lito Queen size	**$695.00**

2 personoj kun 1 lito Queen size	**$695.00**
2 personoj kun 2 litoj Queen size	**$895.00**
3 personoj kun 2 litoj Queen size	**$895.00**
4 personoj kun 2 litoj Queen size	**$1,045.00**

Pliaj informoj: la ĉambroj havas sendratan reton, televidilon, monŝranketon kaj telefonon. La **matenmanĝo ne estas inkluzivita.**

Retejo hispane: http://hotelgala.com.mx/index.html

Retejo angle: http://hotelgala.com.mx/index-en.html

Retejo france: http://hotelgala.com.mx/index-fr.html

5. Hotelo *Villa Monini*

Adreso: Calle 5 Sur 2708-B, Insurgentes Centro, 72420 Puebla, Pue. Inter 27 Poniente kaj 29 Poniente. Proks. 2,0km. for de la kongresejo.

Telefono: enurbe 237 0905 **/ enlande sed eksterurbe** (01) 222 237 0905 **/ de eksterlando** (0052) 222 237 0905

Ĉi tiu hostalo troviĝas je dek kvin stratoj piede for de la historia urbocentro,

La **kostoj** por ĉiu nokto kaj ĉambro estas:

1 persono kun du litoj duoblaj	**$690.00**
2 personoj kun 2 litoj duoblaj	**$799.00**
3 personoj kun 2 litoj duoblaj	**$980.00**
4 personoj kun 2 litoj duoblaj	**$1,171.00**

Pliaj informoj: ĉiu ĉambro havas du litojn duoblajn, televidilon, sendratan reton, skribotablon, necesejon kaj banujnon, tagan purigadon, gladilaron, sofon, malgrandan fridujon. La matenmanĝo ne estas inkluzivita. Por alveni al la kongresejo vi povas piediri 750 metrojn por preni la aŭtobuson "*metrobús* linio 1" kies plej proksima haltejo troviĝas sur la strato 11 Sur (surmape "*Constitución de 1917*"). Vi devas preni la menciitan buson kaj peti la ŝoforon lasi vin ĉe la haltejo "*Alpha*", post kelkaj paŝoj vi trovos la kongresejon. Oni povas rezervi per telefono, per la retejo de la hotelo aŭ skribante al la retadreso: reservaciones@hotelvillamonini.mx

Retejo hispane: http://www.hotelvillamonini.mx/index.html

6. Hostalo *Gente de Más*

Adreso: Av. 3 Pte. 713, Centro, 72000 Puebla, Pue. Inter 7 Sur kaj 9 Sur. Proks. 2,6km. for de la kongresejo.

Telefono: enurbe 232 1986 **/ enlande sed eksterurbe** (01) 222 232 1986 **/ de eksterlando** (0052) 222 232 1986

Ĉi tiu hostalo troviĝas en la urbocentro proksime al la "*Zócalo*" kaj al restoracioj kaj butikoj.

La **kostoj** por ĉiu nokto kaj ĉambro estas:

en privataj ĉambroj:

1 persono kun 1 lito duobla	**$450.00**
2 personoj kun 1 lito duobla	**$450.00**
2 personoj kun 2 litoj duoblaj	**$650.00**
3 personoj kun 2 litoj duoblaj	**$650.00**
4 personoj kun 2 litoj duoblaj	**$650.00**

en ĉambro por 6 personoj (nur virinoj):

1 persono kun du-etaĝa lito	**$180.00**

en ĉambro por 6 personoj (virinoj kaj viroj):

1 persono kun du-etaĝa lito	**$190.00**

Pliaj informoj: la kosto inkluzivas matenmanĝon, sendratan reton kaj varman akvon. Por rezervi oni devas telefoni kaj sciigi retadreson al kiu ili sendos bankan kontonumeron. Oni devas deponi la duonon de la kosto por validigi la rezervon. Por alveni al la kongresejo oni piediru 350 metrojn al strato 11 Sur (surmape "*Constitución de 1917)* por atingi la busan haltejon "metrobús linio 1", oni prenu la buson kaj elbusiĝu en la haltejo "Alpha, tuj poste vi vidos la kongresejon.

Retejo angle: http://gentedemashostel.com/

Mapo kie troviĝas la "Centro Universitario de Servicios de la BUAP" (per verdkolora dometo), nia kongresejo kaj la rekomenditaj hoteloj lau ĝia numero en la listo. Proksimuma lokigo.

https://drive.google.com/open?id=1Xf-QYj-AqJ3Lpftuo_OR3_iEX2jScSCx&usp=sharing